



BRAZILA ESPERANTISTO OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

ISSN 0006-9477




9 770006 947005 00005



105-a jaro
N-ro 343
Decembro 2012

BARRA DO GARÇAS - MT




48-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
De la 18-a ĝis la 22-a de januaro 2013

Kovrilo

Sur la kovrilo troviĝas
foto de la urbo Barra do
Garças, kie okazos la
48-a BKE.

- 03** Ĉefartikolo
- 04** Poemo: Maria Nazaré de C. Laroca
- 05** Omaĝo: Néia Lúcia Souza
- 06** Artikolo: João José Santos
- 08** Evento
- 09** Informo
- 10** Recenzo: Ismael Gomes Braga
- 12** Historio: Eurípedes A. Barbosa
- 14** Artikolo: Benedicto Silva
- 17** Kroniko
- 18** Forpaso



Eldiro

“La Esperanto-Movado ne estas kaj ne povas esti neŭtrala rilate tiujn tendencojn, kiuj kontraŭas la Internacian Lingvon kiel tian, aŭ detruas la bazajn principojn de egaleco, solidareco kaj libereco, sur kiuj sole povas kreski kaj prosperi Esperanto...Esti indiferenta koncerne la rektajn atakojn kontraŭ Esperanto kaj kontraŭ tiujn ideojn, kiuj estas esence ligitaj al ĝi, ne estas neŭtraleco, sed malkuraĝo kaj stulteco.”

Ivo Lapenna (1909-1987). Kroato, juristo, ĵurnalisto, verkisto, profesoro pri juro en Londono, prezidanto de UEA dum la periodo 1964/1974, fondinto kaj prezidanto de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj kaj redaktoro de Internacia Jura Revuo, elokventa oratoro.

Revukunlaboraĵoj: La ĉefredaktoro rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de la legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajtojn: **1-e:** Ne sciigi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii publikigon; **4-e:** Mallongigi tekston tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko”, de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en “Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto” (2005) oni aparte klarigu per glosaro.

Anonctarifo: Tabelo pri prezoj (Brazila Esperantisto) Onoj de paĝo (anoncoj)

● Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustri kaj apartenas al la posedantoj

tutpaĝa (19x25cm)
4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora)
2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00
(nigra-blankaj)

1/2 duonpaĝa (9x24cm)
R\$ 450,00 (kolora)
R\$ 300,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa horizontale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa vertikale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/6 sesonpaĝa (7.8x8.8cm)
R\$ 150,00 (kolora)
R\$ 100,00 (nigra-blanka)

FINIGĜAS LA OFICPERIODO

Bondezirante al ĉiuj legantoj de nia revuo okaze de la jarfino, ni ŝatas diri kelkajn vortojn pri nia oficperiodo, kiu finiĝos la 19-an de januaro 2013.

Kun ĝojo ni konstatas, ke la nuna estraro sukcesis, malgraŭ la malfacilaĵoj. BEL sufiĉe respondas al la bezonoj de nia movado. Kongresoj okazas. La revuo aperas kvarfoje jare. BEL eldonas librojn, ekzemple "Neforgeseblaj Skribaĵoj de Ismael Gomes Braga", "Ni lernu kun Porto Carreiro Neto" kaj "La vidvino" (dua eldono). Ĉi tiu lasta modele tradukita de Porto Carreiro Neto. Cetere, la Libroservo plivigliĝas, danke al la senlaca laborado de Francisco Mattos de Oliveira.

Nia nuna estraro agas serioze kaj indulgeme. Indulgemo pri la stranguloj, fuŝuloj kaj parazitaj, kiuj bedaŭrinde abundas en ĉiu movado kaj la nia ne esceptas. Ni rekonas, ke ekzistas la pozitiva flanko de la movado.. En tiu flanko troviĝas utilaj esperantistoj, kiuj elspezas monon kaj tempon por varbi samurbanajn, aranĝas ekspoziciojn, budumas en festivaloj, gvidas kursojn., partoprenas en kongresoj. Ili vere laboradas por nia idealo. Pro tio, ili helpas ankaŭ Brazilan Esperanton Ligon. Ni tre dankas kaj laŭdas tiajn aktivulojn.

Kontentigis nin la kandidatiĝo de Carlos Pereira, de Evandro Avellar kaj de aliaj samideanoj al la estrarpostenoj de BEL, elektotaj kadre de la 48-a BKE, en Barra do Garças. Carlos Pereira kandidatiĝas al la prezidanteco. Ni certas, ke ili bone direktos nian jarcentan institucion.

Ni kaptas la okazon por danki al Benedicto Silva, Paulo Nascentes, Francisco Stefano, Sandro Moreira Alves, Paulo Sérgio Viana, João José dos Santos, Fabiano Henrique, Osmar da Silva Alves, Evandro de Freitas, Floriano Pessoa kaj aliaj, kiuj kunlaboris kun "Brazilia Esperantisto". Ili verkis artikolojn, tradukis literaturaĵojn kaj reviziis tekstojn. Dankegon, karaj amikoj!

Ni informas, ke samideanoj de Florianópolis, ŝtato Santa Catarina, deziras okazigi en tiu bela urbo la 49-an Brazilan Kongreson de Esperanto, de la 24-a ĝis la 28-a de januaro 2014. Estos sendube belega kongreso.

Fine, la estraro de BEL deziras al ĉiuj esperantistoj Feliĉan Kristnaskon kaj Prosperan Novjaron.

Ĝis Barra do Garças, turisma kaj bela urbo, si-dejo de la venonta brazila kongreso.



Brazila Esperanto-Ligo



Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazilia Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
104-a jaro - Junio 2011 - N-ro 337

Eldona Stabo

Respondeca ĵurnalisto: Viviane Castro

Ĉefredaktisto: Eurípedes Alves Barbosa

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Benedicto Silva, Francisco Stefano Wechsler, Paulo Sérgio Vianna,
Maria Eloá de Souza Lima

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Viviane Castro

Revizio kaj tradukado: Eldona Komisiono

Presejo: Gráfica Sergipe (Brasília/DF)

Kontribuaĵojn kaj mesaĝojn sendu al la retadreso de la ĉefredaktisto: euripedes-barbosa@ig.com.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Fondita en 1907

Sidejo SDS - Bloco P,36 - salas 301/303 - Ed. Venâncio III CEP 70393-902 - Brasília/DF
Telefona (0xx61) 3226 1298 Fakso (0xx61) 3226 4446

Retadreso bel@esperanto.org.br Hejpaĝo www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto S-ro Lício de Almeida Castro Vic-prezidanto S-ro Eurípedes Alves Barbosa
1-a Sekretario S-ino Sufia Alves de Lima 2-a Sekretario S-ro Carlos Alfredo Aragón Guerreir
3-a Sekretario S-ro Devanizio Apolinário dos Santos
Financa Direktoro vaka. Kasisto S-ro Darci Gomes Sardinha

Kontrolo Konsilantaro

Aymoré Vaz Pinto, José Carlos Dorini Ramos, Adolpho de Miranda Silva, Lia Milhomem Moreno,
Cleto Galvão da Silva, Evandro Ferreira de Avellar

Federacia Konsilantaro

Prezidanto S-ino Maria das Dores Góes

Komitatano-A Paulo Nascentes

Ĉefdelegito de UEA James Rezende Piton

Eroj kaj ĉifonoj

Maria Nazaré de C. Laroca

La maskoj de la nokto
Akrobate ludas
Kun cia nomo
Alkroĉita al steloj.

Mi dume kudras
Pluvĉifonojn
Kaj kungluas erojn
Falintajn el plenluno
Sur leterojn en tirkesto
Kiuj aromas
Resopire kaj lavande.

Ekstere,
La parfumo
De l'noktfloroj
Organizas l' abismon.

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

4

N
r
o

3
4
3

D
e
c

2
0
1
2

Eminentaj virinoj en la Brazila Esperanto-Movado

NÉIA LÚCIA SOUZA



Neima Adorno kaj Néia Lúcia (dekstre).

NÉIA nuntempe respondacas pri la biblioteko Carlos Domingues, de Brazila Esperanto-Ligo, kien ŝi iras preskaŭ ĉiutage. Esperanton ŝi konas detempe de sia infanaĝo, sed ŝi faris bazan kurson en 1973, en Goiânia.

Néia estis prezidantino de Brasília Esperanto-Asocio de 1984 ĝis 1986, kaj oni povas aserti, ke tiu estis sendube la plej fruktodona periodo de BEA. La asocio okazigis tiutempe gravajn kulturajn kaj sociajn eventojn, interalie, la Unua Esperanto-Renkontiĝo de Federacia Distrikto, en la satelita

urbo Gama, la 31-an de aŭgusto 1985.

Néia ankaŭ okupis la prezidantecon de Brazila Esperanto-Ligo, laŭ sia elekto okazinta dum la 22-a Brazila Kongreso de Esperanto, en la urbo Curitiba, en julio 1986. Poste ŝi estis reelektita por la periodo 1992/1995, sed pro profesia kialo la samideanino rezignis la postenon. Ŝi estis ankaŭ vicprezidantino de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO). Néia redaktis la bultenon Momenton, de BEJO.

Kiel prezidantino de BEL, Néia ricevis en la 6-a de novembro 1986 la medalon "Mérito Alvorada", pro sia kontribuo al la progreso de Federacia Distrikto, donitan de la loka registaro.

Néia partoprenis plurajn esperantajn aranĝojn, naciajn kaj internaciajn, ekzemple, ŝi ĉeestis en la Konferenco "Esperanto 88", kiu okazis en Havano, Kubo, de la 30-a de novembro ĝis la 2-a de decembro 1988.

La bulteno Impulso, eldonita de BEJO, n-ro 1, aperigis la jenan opinion de Néia: "La socia vivo kiun Esperanto faciligas, la kontakto kun diversaj agrablaj kaj amindaj personoj, la interparoladoj kaj korespondado, ĉio kontribuas por mia ĉiutaga renoviĝo pri espero, kredo kaj fido al la homoj."

Tiu kara samideanino studis Biblioteksciencon en Universitato de Brasília kaj diplomiĝis en la jaro 1981. Ŝi emeritiĝis kiel bibliotekistino de la Deputita Ĉambro. Ŝi naskiĝis en Serranópolis, ŝtato Goiás, la 10-an de septembro 1955.

Néia Lúcia Souza meritas sendube la omaĝon de la brazila esperantistaro pro sia senlaca laborado por nia grava idealo. ★

Bruetoj kaj interjekcioj

João José Santos

joaojosesantos@gmail.com - www.lakaravelo.net

Dankon al Valentin Melnikov, rusa esperantisto, pro la revizio kaj aldono de ruslingva ekzemplo.

Oni eku el la principo, ke ne ekzistas homoj, kiuj iel, eĉ se minimume, ne havas denaskan lingvon. Eble en militaj situacioj, tio bedaŭrinde okazas. Tamen, ne pri tiuj nenormalaj situacioj oni aludas en ĉi tiu artikolo. Do ĉiu homo kapablas uzi almenaŭ unu lingvon, la denaskan. Sen mastrumado de lingvo, eblas al homo apenaŭ havi konceptojn, ĉar la kreado de konceptoj estas intime ligata al la regado de lingvo.

Kiam homo eligas sonon el la buŝo, ekzistas du eblecoj:

- a) Tiu sono perigas signifon inter la parolantara komunumo, kiu uzas tiun lingvon;
- b) tiu sono ne havas signifon, kaj do ĝi estas bruoj aŭ bruetoj.

Se, parolante la portugalan, viaj frazoj komenciĝas per gorga daŭra sono [haaaa], eble la portugallingva komunumo komprenos, ke vi hezitas antaŭ ol diri, kion vi intencas. Tamen, ĉu vi certas ke, aŭdante tion, ĉino, arabo aŭ zuluoj komprenos, ke vi hezitas? Eble kelkaj el ĉi tiuj popoloj pensos same kiel la portugallingvaj popoloj, sed eble aliaj pensos, ke doloras io al vi, aŭ ke vi estas en ia organika stato de premezo.

Kaj kion diri pri onomatopeoj, pri gestoj kaj pri interjekcioj?

Kiam oni petas de portugalo, ke li skribu kiel blekas hundo, li skribas "La hundo blekas Ĥŭ, aŭ, aŭ!" Trans la Atlantiko, respondante al la sama peto, brazilano skribas "La hundo blekas Aŭ, aŭ, aŭ!" Do, homoj parolantaj la saman lingvon, sed laŭ alia dialekta variaĵo, perceptas la hundan blekon alimaniere. Demandu al germano, kiel blekas hundoj. Li diros "La hundo blekas Vaŭ, vaŭ, vaŭ!" Ruso diros, ke hundo blekas Gav, gav! Daŭra esploro pri la afero donos surprizajn rezultojn. Kiel diras esperantisto? Ĉu laŭ la portugala, brazila, germana aŭ rusa maniero? Se temas pri serioza esperantisto, li diras laŭ la maniero, kiu aperas en la bonaj esperantaj vortaroj, kiu estas "Baŭ, baŭ, baŭ!".

Portugaloj malfermas la manon en direkto de alia homo, kiam ni intencas ordoni aŭ rekomendi, ke la alia atentu. Tamen, ne faru tion en Grekio. Grekoj faras la samon, kiam ili sentas koleron. Konklude, ne pensu, ke viaj gestoj estas internaciaj. Ne eblas envortarigi gestojn, grimacojn kaj aliajn videblajn teniĝojn, do evitu tro da videsprimivo, kiam vi parolas




Foto de João José Santos

en esperanto. Ridetu afable kaj sincere. Tio estas bona en iu ajn lando, se vi ne troigas la ridetojn.

En Portugalio kaj en Brazilo, se vi uzas la interjekcion "Ha... ha!", per forta, impeta, daŭra sono, tio estas komprenata kiel: "Mi pravis!" Tamen, ĉu vi certas, ke tiu sono interpretiĝos sammaniere far homo de alia lando? Do, anstataŭ "Ha... ha!", diru en esperanto "Mi pravas!".

Bedaŭrinde, eĉ kelkaj kleraj esperantistoj ankoraŭ ne malkovris, ke interjekcio estas vorto samrajta kiel substantivo, adjektivo aŭ adverbo. Ĝuste pro tio, aperas nun ĉi tiu artikolo. Ili pensas, ke oni rajtas eldiri iun ajn sonon por esprimi siajn sentojn, en iu ajn lingvo. Tio ne veras, kiel montrite. Konsultante la plej prestiĝan esperanto-vortaron, NPIV (Nova Plena Ilustrita Vortaro), oni trovas multajn interjekciojn. En Portugalio, kelkfoje, antaŭ mizera situacio, homoj mire kaj kompate eldiras "Ŝiiiiiiiiiii!" Tio en esperanto estas nenio. Aŭ pli bone... tio signifus ian miron pri iu ŝi. Kiel oni dirus en esperanto? Sendube, oni diras "Ve!" Do, lernu esperantajn interjekciojn, se vi volas esprimivon en esperanto. Kelkaj parolantoj diras: "Sed mi estas brazilano, do mi rajtas min esprimi laŭ mia maniero!" Jes, ili rajtas, en la brazil-portugala lingvo, ne en aliaj. Kiam oni lernas lingvon, oni faras implicitan kontrakton kun la parolantara komunumo de tiu lingvo. En tiu kontrakto estas skribite: La nova parolmembro devas paroli proksimume kiel ni. Akceptu tion senĝene kaj humile, se vi deziras esti bona esperantisto, ne fuŝesperantisto.

Ha! Ho! Jes! Ja! Mi preskaŭ forgesis. Kiam vi prenos vian telefonon, kaj scios, ke esperantisto estas en kontakto kun vi, diru: Saluton, mia amiko! Kiel vi fartas? Vi rajtas diri nur Saluton! Vi eĉ rajtas nur diri Salaton!, se vi volas spriti antaŭ via amiko, sed vi ne rajtas enkonduki interjekcion, kiu ekzistas en alia lingvo, sed ne en esperanto.

Konklude kaj sinteze, jen du rekomendoj ĉi-temaj, kiam vi parolas en esperanto:

1. Ne tro gestu nek grimacu, ĉar viaj gestoj aŭ grimacoj povas signifi alion en la menso de via kunparolanto, depende de lia kulturo;
2. ne uzu la interjekciojn de via lingvo, sed tiujn uzatajn en esperanto, kiujn vi devas lerni, ĉar ili estas vortoj kiel la aliaj.

Ĉi tio ne estas speciala malfacileco de esperanto. Se oni parolas alian lingvon, oni devas havi la saman zorgon. La internacia interkomuniko postulas regulojn. Lernu ilin.

Saluton! ★

Plej Turisma Brazil Kongreso de Esperanto

Barra do Garças gastigos esperantistojn el pluraj urboj de Brazilo kaj de aliaj landoj, de la 18-a ĝis la 22-a de januaro 2013, kiam okazos la 48-a Brazila Kongreso de Esperanto, la plej grava brazilana esperanta aranĝo.

La urbo Barra do Garças, fama pro siaj mirindaĵoj kaj akvaj elfluejoj, troviĝas en la ŝtato Mato Grosso, centrokcidenta regiono de Brazilo.

La Ĉeftemo de la kongreso estas "Esperanto, Kulturo kaj Turismo: Alternativoj por Verda Ekonomio". James Rezende Piton, ĉefdelegito de UEA por Brazilo, oratoros pri la ĉeftemo.

Okazos ankaŭ la 33-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso (BEJK) kaj la 11-a Brazilana Kongreseto, samtempe kaj samloke. Kadre de la kongresa programo, unuafoje oni faros la Internacian Festivalon de Esperanta Kanzono.

La programo enhavas riĉan provizon da prelegoj. ★

PRELEGANTOJ KAJ TEMOJ

Adonis Saliba , São Paulo-SP	Programo mia amiko – kiel produkti esperantistojn per la reto?
Alfredo Guerrero Aragón , Rio de Janeiro-RJ	La rolo de muzikoj en la homa edukado.
Edvige Tantim Ackermann , Italio	Mia urbo Trieste (filmo).
Elmir dos Santos Lima , Rio de Janeiro-RJ	Vespertoj: Kulturo kaj Turismo.
Giuseppe Grattapaglia , Alto Paraíso-GO	Ĉu Esperanto havas kulturon?
Isis Okabe Piton , Paulínia – SP	Perspektivoj de edukado por la laboro.
James Rezende Piton , Paulínia-SP	Plia vojaĝo en tempo-maŝino.
Jean Okabe Piton , Paulínia-SP	La arto de origamio.
João Silva dos Santos , Rio de Janeiro-RJ	Esperanto kompare al vivaj lingvoj.
Maarten Luc Rosa Deprez , Belgio	Esperanto – invado en Hanojo, Vietnamio.
Néia Lúcia Souza , Brasília-DF	Biblioteko Carlos Domingues.
Rafael Henrique Zerbetto , Campinas-SP	Pasporta Servo kaj Turismo.
Roman Dobrzynski , Pollando	La kuracejo de D-ro Zamenhof (filmo).
Túlio Flores , Belo Horizonte-MG	Esperantigo de Brazilanoj.
Ursula Grattapaglia , Alto Paraíso-GO	Kiel interesi homojn pri Esperanto.

Programo Amikaro de la Biblioteko

Geamikoj, estu bonvenaj!

BIBLIOTEKO CARLOS DOMINGUES alvokas vin esti Amiko kaj Amikino de la Biblioteko!

Programo Amikaro de la Biblioteko celas kunigi homojn aŭ entreprenojn kiuj pretas kunlabori en la konservado, kreskigo, disvastigo kaj disponigo de la libro-kolektoj de Biblioteko Carlos Domingues, pere de financa kontribuo.

La financa helpo subtenos la bibliotekajn taskojn kaj ebligos la aĉeton de ekipaĵoj, meblaro kaj diversaj materialoj, subtenos la realigon de la bibliotek-projektoj kaj ebligos la aĉetadon de novaj verkoj por la kolekto.

La interesatoj povas kunlabori per la donaco de R\$1.000,00(mil realoj) kiu povas esti unufoja aŭ dividita ĝis 10 foje.

Entreprenejoj povas helpi specifan projekton kadre de la programo kaj ricevi propagandspacon em Bel paĝaro kaj Brazila Esperantisto.

En la teksto de la programo ni pritraktas pri kio ĝi estas; kio pravigas ĝin, la celoj, kiel membriĝi, la garantiitaj redonoj al la kunlaborantoj (la geamikoj de la biblioteko) – tiuj redonoj ne povas altigi la elzpezojn de la biblioteko aŭ de BEL. Pritraktas ankaŭ la destinadon de la mono, la projektojn disvolvotajn, la buĝeton kaj la limtempon.

La buĝeto sumis R\$25.767,00 kaj ni plusis al R\$30.000 por kovri eventualajn pagmankojn.


La programo estis startita en januaro 2012 kaj ĝia unua fazo, kiu celas la aĉetadon de la mankantaj eroj, kaj plenumado de pluraj bibliotekaj taskoj marŝas.

Nun ni invitas la leganton esti unu el la kolonoj de Programo Amikaro de la Biblioteko .

La kompleta programo vi povas peti al Brazila

Esperanto-Ligo, poŝte, retroŝte aŭ pertelefone.★

Néia Lúcia Souza
BEL-Bibliotekistino
CRB1-700
neialuciasouza@gmail.com



Aktualaj problemoj de la nuntempa intenacia vivo

Verko de Ivo Lapenna, Rotterdam, 1952

Ismael Gomes Braga

En la tri sencoj ĉi tiu libro estas tre atendinda: 1-e. Ĝi estas originale verkita en perfekta Esperanto kaj tio estas tre signifa por la formado de memstara kulturo sendependa de geografiaj limoj; 2-e. Ĝi instruas al laikoj ĝeneralajn principojn de faka scienco; 3-e. Ĝi pravas la evoluadon de juro en universala senco limiganta naciajn suverenecojn, kiuj tiom da abomenindaj krimoj jam faris en la mondo.

10

Leginte unu post alia la kvar originalajn volumojn "Kredu min, Sinjorino", "Retoriko", "Aktualaj Problemoj" kaj "Kvaropo", ni havas antaŭ la okuloj de nia fantazio la estontan literaturon de la homaro: verkitan ĉie por ĉieaj homoj. Tio ĉi estas la ekapero e nova kulturo tute planeda, universala, sen la antaŭaj limigoj lingvaj, naciaj, rasaj, geografiaj kaj religiaj. Rutino estas tre forta kaj nur malrapide kapitulacas, sed ĝi nepre iam estos venkita! Feliĉe la mondon gvidas ne la granda amasoj, sed malgranda elito de la plej kleraj, kaj nepre tendenco de nia epoko estas universaligo de ĉiuj principoj, tial la progresemaĵoj esperantistoj iam estos la gvidantoj de la pensanta homaro.

2
0
1
2

La diskonigo de scienco ĉe la scivolema popolo ankaŭ nepre fariĝos, ĉar la homoj estas ĉiam pli kaj pli avida ĉion kompreni, kaj precipe juro al ĉiu el ni interesas por nia propra konduto, por defendo de niaj rajtoj.

La senlima nacia Suvereneco, kovranta ĉiujn formojn de tiraneco kaj krueleco, estas heredaĵo el senbrida barbareco kaj devas esti komdamnata.

La aŭtoro donas al ni faktan ekzemplon pri tiu kondamno: la defendo de la germanaj militkrimuloj estis lerte farita kaj pruvis, ke tiaj agoj en suverena germana ŝtato estis laŭlegaj, tial ili ne estis krimaj en germana teritorio; sed la juĝistoj malakceptis tiun defendon, ĉar tiaj agoj estas krimo antaŭ la universala leĝo de humaneco kaj moraleco. Sekve, la akuzitoj estis laŭleĝe pendigitaj en la germana urbo Nurenberg.

Legante tiun ĉi libron laŭkaj havas tutan serion da demandoj antaŭ ni: (1) Ĉu mortpuno ankaŭ ne estas internacia krimo? (2) Ĉu atombombo ne estas internacia krimo, ia formo de

genocido? (3) Ĉu konfisko de propraĵo fare de komunistoj aŭ monopollo fare de kapitalistoj ne estas krimo? Kiom da demandoj ni deziras fari al kleraj juristoj, kia estas Prof. Ivo Lapenna!

Tiu ĉi libro estas unu el la plej elstara monumentoj de nia literaturo. Ĝi ne celas nur fakulojn, sed nin ĉiujn. Ni ĉiuj devas ĝin posedi kaj atente studi. ★

(el la verko NEFORGESEBLAJ SKRIBAĴOJ DE ISMAEL GOMES BRAGA)



Ismael Gomes Braga



Ivo Lapenna

Ekministro Saulo Ramos, kunfondinto de KKE

Eurípedes A. Barbosa

En la informilo Inko, septembro/oktobro 2006, oni povas legi la protokolon pri la fondo de Kultura kooperativo de Esperantistoj (KKE). Tiu grava dokumento montras la nomojn de la kunfondintoj de KKE, inter ili, "Saulo Ramos, Cravinhos, SP", laŭ la numero 59.

Mi tuj demandis al mi mem: ĉu temas pri la fama juristo Saulo Ramos, eksministro pri Justico en Brazilo? Post esploro, venis la jesa respondo. La eksministro estis vere esperantisto kaj kunfondis Kulturan Kooperativon de Esperantistoj, la 15-an de julio 1951.

José Saulo Pereira Ramos memlernis Esperanton en la fino de la jaro 1950, same kiel Benedicto Silva, lia amiko, kiu ankoraŭ aktivas en nia movado. La 2-an de marto 2012 mi parolis kun Saulo per telefono kaj li asertis, ke Esperanto estas facila lingvo kaj Zamenhof genia homo. Li klarigis, ke li forlasis Esperanton pro sia intensa laboro kiel advokato, en la urboj Ribeirão Preto kaj San-Paŭlo.

Kiel ĵurnalisto, Saulo Ramos laboris ĉe la gazeto "A Tribuna de Santos". En 1956 li ĉeestis la stadionon Vilao Belmiro kaj spektis la unuan ludon de Pelé kun la uniformo de la Santos Futbal-Klubo. Pro tio, oni povas diri, ke Saulo estas bonŝanca homo.

Li kunfondis la Belettran Akademion de la urbo Santos kaj en 1956, kune kun Geraldo Ferraz kaj Patrícia Galvão starigis la institucion "Centro de Estudos Fernando Pessoa", por disvastigi la poemaron de tiu eksterordinara portugala poeto. Saulo estis ankaŭ Ministro pri Justiça kaj Ĝenerala Konsilanto de la Respubliko.

Benedicto Silva diris al mi, ke Saulo estas talenta poeto kaj verkis la libron "Café (A poesia da terra e das enxadas)" (Kafo: la poezio de la grundo kaj de

la ŝpatoj), kun antaŭparolo de la fama Poeto Guilherme de Almeida. Li verkis ankaŭ la librojn "Assembleia Constiuinte" (Konstitucianta Kunveno) kaj "Código da Vida" (Vivo-Kodo), kiu ricevis fervoran laŭdon de recenzistoj.

Saulo Ramos naskiĝis en la urbo Brodowski, ŝtato San-Paŭlo, la 8-an de junio 1929. En sia junaĝo li profesie ŝoforis kamionon. Li diplomiĝis pri Juro en la Jura Fakultato de Santos kaj fariĝis fama, grava kaj kompetenta advokato.

Ni aldonu, ke Saulo Ramos estis intima amiko de la eminena brazila pentristo Cândido Portinari, ankaŭ naskiĝinta en la urbo Brodowski.

En la libro "Kafo" eĉ aperas portreto de Saulo, farita de Portinari, kun la jenaj dediĉvortoj de la pentristo: "Para Saulo que honrará nossa Brodowski, lembrança afetuosa de Portinari, Brodowski, 1953 (Al Saulo, kiu honoros nian urbon Brodowski, jen kora memoraĝo de Portinari. Brodowski, 1953).★"



Portreto de Saulo Ramos pentrita de Cândido Portinari.

Esperanto kaj Interreto - nuntempaj mirakloj

(kun enkonduko pri la homa kapablo
translokiĝi kaj komunikiĝi)

Benedicto Silva

Kutime mi meditas pri la sorto de la homo sur la Tero, kaj fine mi konvinkiĝas, ke ne hazarde, sed gvidita de mistera, supera potenco, li sukcesis faciligi sian vivon kaj sian agadon tra la tempo.

Miaj konsideroj baziĝas precipe sur io, kion mi rigardas kiel tre gravan: la translokiĝon kaj la komunikiĝon inter la homoj.

Nu, se ni komparus la homon kun kelkaj aliaj vivaĵoj, ni facile vidus, ke li ne estas kreita kun multaj privilegioj.

Unue ni pensu nur pri la homa kapablo translokiĝi sur la materia mondo.

Se, unuflanke, la homo kaj pluraj specioj de bestoj iras nur paŝon post paŝo sur la tero, kaj nur kelkaj vivaĵoj, inkluzive de la homoj, kapablas naĝi, kaj la serpentoj nur mizere kaj humile rampadas, aliflanke, multegaj insektoj estas dotitaj per piedoj kaj flugiloj, povante do paŝi kaj flugi... kaj pluraj specioj de birdoj havas ne nur piedojn por iradi kaj rapide kuri, sed ankaŭ flugilojn, por elegante flugi kaj ŝvebi tra la senfina vasteco de la aera spaco, kaj krome, ankaŭ naĝilojn ebligantajn al ili naĝi sur kaj sub la akvoj de riveroj, de lagoj kaj de maroj...

Tiaj mirindaj eblecoj esta ja al ili malavare donitaj de la Kreinto!

Post la konkero de la maraj profundoj per gigantaj submaraj ŝipoj, la homo realigis la oran revon de Ikaro, sukcesante flugi ne per plumaj flugiloj, sed per potencaj supersonaj aviadoj. Ĉu vi jam pensis pri tio? Se ne, klopodu malkovri inter la naturaj vivaĵoj aliajn speciojn, kaj pliriĉigu mian modestan liston de pri-

vilegiaj estaĵoj, kaj la beletro kaj la scienco estos tre dankaj al vi...

Bone, se paroli ne nur pri translokiĝaj kapabloj kaj rimedoj de la homoj, aparte, kaj de la ceteraj vivaĵoj, ĝenerale, tra la tero, tra la maroj kaj tra la aero, sed ankaŭ pri la homa komunikado tra la vasta (nuntempe, ironie tre malvasta...) mondo, mi nur diru, ke en la lastaj jardekoj, kvazaŭ mirakle neniiĝis la distancoj kaj la tempo.

Dank' al la progreso de la teknologio, la mondo fariĝis eta vilaĝo.

Ne plu ekzistas distancoj, internaciaj kaj interkontinentaj.

Pratempe la distanca komunikiĝo de la homoj fariĝis per tre primitivaj rimedoj.

Tiam, eĉ per nigra fumo leviĝanta el brulantaj lignoj kaj folioj, aŭ per tamburaj sonoj tra la vastaj spacoj intergentaj kaj intertribaj la homoj penadis komunikiĝi.

Poste, urboj kaj landoj estigis pli evoluintajn komunikrimedojn, kiel kurierojn, poŝtojn, telefonon, telegrafon, radion, televidon ktp — grandaj elpenaĵoj de la lastaj jarcentoj de progreso, de delira progreso.

La 20-a jarcento tamen kulminis entute per interreto. Interreto mallongigis la distancon kaj la tempon. Ni rekonu ke la komunikado, se ne banaliĝis, almenaŭ populariĝis, por kontentigi la homan bezonon, aŭ kapricon, informiĝi, ne ĉiam kun kleriga eduka aŭ, minimume, praktika celo.

Kiel okazas rilate al ĉiaj homaj kreaĵoj, se ĝi estas konvene, dece uzata, ĝi nur povas edifi la homon spirite, science ktp. Tio tamen ne ĉiam okazas, ĉar la homo ne ĉiam elektas por si bonan vojon. Tamen, la efiko de iu ajn afero tute ne dependas de la homa uzado, bona aŭ malbona, racia aŭ neracia, sed nur de sia reala valoro. En si mem kuŝas la valoro de la grandaj homaj inventoj.

Nebezzone diri, ke interreto revoluciis la komunikeman instinkton de la homoj. Sen la iom komplika sistemo de la telefono kaj telefonado, kaj sen la limigo de la konversacia tempo, pro la prezo de la uzado, la interreto fariĝis la ideala komunikilo ne nur de profesiuloj, komercistoj, entreprenistoj kaj aliaj fakuloj, sed ankaŭ de la junularo en la tuta mondo.

Interreto estas komplemento de lingvo, kaj inverse.

Esperanto kuniĝas por alproksimigi la homojn vivantajn en antipodaj landoj, kvazaŭ la terglobo estas ununura regno kun ununura popolo.

Inventita por esti la dua lingvo de ĉiuj popoloj, ekde sia kreiĝo Esperanto estas uzata, skribe kaj parole, sur la tuta terglobo, sen la danĝero dialektiĝi, ĉar garantias ĝian unuformecon ne nur la ekzisto de, por tiel diri, kontrolo centro (Universala Esperanto-Asocio kaj ties monata organo, la revuo "Esperanto") kaj ankaŭ kaj precipe potencaj komunikiloj (radio, televido kaj interreto), forte tenante ne nur la unuformecon de la lingvoj, sed ankaŭ aliajn kulturajn trajtojn de la homoj en la tuta mondo: vestoj, muzikoj, sportoj, ludoj, vivmanieroj ktp, kun forta, potenca tendenco unuformiĝi... Tio ne okazis, certe, antaŭ iom pli ol unu jarcento, kiam ne nur vilaĝoj, urboj kaj eĉ landoj izoliĝis pro manko de komunikaj kaj aliaj rimedoj...

Dank'al la progreso de la teknologio, ni povas esperi, ke Esperanto kaj ankaŭ la naciaj lingvoj ne plu dialektiĝos, kio estis fatala en ĵusa pasinteco...

Kaj la esperantistoj mem konscie strebas al la unuformeco de sia interlingvo. ★



Fonto: el interreto

Brazila Kroniko

Kio okazas en via Regiono?

Lanço de poemlibro ĉe Kultura Kooperativo de Esperantistoj - KKE

La 23-an de novembro 2012, je la 18h30, en la sidejo de **Kultura Kooperativo de Esperantistoj -KKE**, en Rio, okazis lanço de la libro **POEMTRANSIRO** de **Maria Nazaré Laro-ca** (fote), el Juiz de Fora, MG.



Estis poemo-deklamadoj en Esperanto per gesamideanoj Dirce Sales, Tânia Paixão, Neide Barros, Graça Thuler, Nilde Barros Diuana, Saulo Salgado Wanderley, Jair Salles.

Aldone, Dirce Sales kantis belajn muzikojn en Esperanto. Estis tre amika, gaja kaj varma etoso.


En EASP – SP, dum la zamenhofa festo, la venontan 15-an de decembro, ankaŭ okazos lanço de la libro **POEMTRANSIRO**.

Mi elektis unu el miaj poemojn esperantigitajn de mi:

Alkemio

Mi plu travivas
Foreston vian
Alkemie.

Per lamenoj
De l'poezio
Mi trapasas



Mian reversion
Versigitan


Kaj reinventas
La sopiron
Pri vi, ostaĝo
De foto via.



Internacia Junulara Kongreso 2014 estos en Brazilo!!

TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, anoncis, ke la **70-a IJK - Internacia Junulara Kongreso** okazos en Brazilo en 2014. Estos la dua IJK en Brazilo. La unua okazis en Pato Branco, en Paranao. BEJO estos la organizo, kiu respondecos pri la kongreso, sed ni ankoraŭ ne povas informi la lokon kaj la daton de la kongreso, ĉar nia skipo studas kiu estas la plej bona ebleco inter pluraj. Eventualaj partnerecoj kun la registaroj povos esti gravegaj por la decido.★





CARLOS LIMA MELO forpasis la 2-an de septembro 2012, en Goiânia, kie li loĝis dum multaj jaroj. Li naskiĝis en Crateús, Ceará, la 9-an de oktobro 1947. Kiel kuracisto, li dediĉis al homeopatio 37 jarojn de sia intensa vivo.

Laŭ opinio de Aloísio Sartorato, **"Melo estis tre aktiva esperantisto en Brazilo en la 60-aj kaj 70-aj jaroj, kunfondis BEJO-n kaj instruis Esperanton al miloj da homoj en amasaj kursoj okazintaj en la nordorienta regiono."**

Por instrui nian lingvon, Melo kreis la naturan metodon.

Pluraj samideanoj bedaŭris la morton de Carlos Lima Melo. Kelkaj el ili esprimis kondolencon en interreto.

Joaquim Mariano, el Goiânia: **"Mi esprimas profundan kondolencon pro la forpaso de nia Kara Melo. La esperanta movado perdis grandan valoron kaj mi, aparte, perdis mian privatan kuraciston."**

Ursula/Giuseppe Gratapaglia, el Bona Espero: **"La Esperantista Institucio BONA ESPERO sendas sincerajn elkorajn kondolencojn al la esperantistaro de Goiânia kaj la familio de Carlos Lima Melo pro lia transpaso al alia dimensio."**

En la sepdekaj jaroj doktoro Melo kunlaboris kun la edukaj programoj de Bona Espero kaj en la urbeto Alto Paraíso kun bona rezulto kaj ni volonte memoras lian viziton en la 40jara datrevena festo 1997."

Álvaro Luiz, el Goiânia: **"Tio fakto malfeliĉigas nian esperantan movadon. Carlos Lima Melo estis granda esperantisto, instruis nin per via Natura Metodo ..."**

Nijl Blonstein, el Novjorko, Usono: **"Mi kondolencas. Mi memoras mian agrablan akcepton en Goiânia, en la domo de D-ro Melo, antaŭ iuj jaroj."**

Harymilton Lopes, el Goiânia: **"Kortuŝite mi legis la informon pri la forpaso de nia kara amiko Melo. Oni bedaŭras lian foreston tamen certas ke en tiu nova dimensio li daurigos sian laboron favore al nia lingvo. Lian naturan metodon mi ankoraŭ uzas ĉe miaj gelernantoj."**

Enivaldo Alves Silva, el Brasília: **"Melo estis mia UNUA kaj SOLA instruisto de Esperanto, kiam invitinta de UFAL- Federacia Universitato de Alagos, li gvidis 20-horan kurson, kiun mi partoprenis en la jaro 1972 en Maceió. Tiu enkonduka kurso ja estis sufiĉa por daurigi memlernadon de la lingvo."**

Akceptu, karega Melo, kie ajn vi estas en la spirita mondo, plej elkoran dankesprimon tiurilate."

La revuo Esperanto, oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (novembro 2012) aperigis informon pri nia neforgesebla samideano:

"Carlos Lima Melo (1947-2012) mortis la 2-an de septembro en Goiânia (Brazilo). Li estis dumviva membro de UEA kaj, profesie kuracisto, fakdelegito pri medicino kaj homeopatio." ★

Kanzono

BRAZILA ESPERANTO – LIGO

48-a Brazil Kongreso de Esperanto
INTERNACIA FESTIVALO DE LA ESPERANTO – KANZONO

Municipa Teatro Fernando Peres de Farias
Salono Zamenhof – 20 jan 2013 – 20h
Barra do Garças - MT

REGULARO

- 1 – Aliĝoj senpagaj permesataj al tutmondaj geesperantistoj ĝis la 15-a de jan 2013. En la mateno de la 20-a de januaro (dimanĉe), oni faros selekton de maksimume ĉirkaŭ 10 (dek) kandidatoj;
- 2 – La **I IFESKAN**, en sia unua eldono, estas libertema kun muzikoj kaj tekstoj malfermitaj ekskluzive al originalaj kaj neeldonitaj kanzon-verkoj en la internacia lingvo. **Plagiato**, evidente, estos malpermesata;
- 3 – La **I IFESKAN** okazos se aliĝos minimume 05 (kvin) kandidatoj;
- 4 – Ĉiu kantisto rajtos prezenti **nur unu kanzonon**;
- 5 – Estos malpermesata la aliĝo de membroj de la komitatoj nacia kaj loka;
- 6 – Brazil Esperanto-Ligo rajtos arkivi, konseŭvi, eldoni kaj diskonigi la ricevitan materialon;
- 7 – Ĉiuj kandidatoj devos enskribiĝi per INTERRETO, citante kompletan nomon, naskiĝ-daton, adreson kaj aneksante foton de la identigilo, son-registron aŭ filmeton de la kanzono;
- 8 – La juĝ-komisiono **rigore** observos la ĝustecon de la prononco kaj de la teksto de la kanzono;
- 9 – Estos elektitaj 05 (kvin) venkintojn. La tri unuaj gajnos mon-premiojn, nome:
Unua Loko: R\$2.000,00 – (760Eŭroj)
Dua Loko: R\$1.000,00 – (380Eŭroj)
Tria Loko: R\$500,00 – (190Eŭroj)
La du aliaj (4-a kaj 5-a lokoj) ricevos honor-mencion.
- 10 – La alsendo de la kanzono fare de la kandidato, implicas la akcepton de ĉi tiu Regularo de la **I IFESKAN**. Por enskribiĝi, bv. retmesaĝi al la Ĝenerala Sekretario de LKK: Amarílio Hevia de Carvalho –

- amariliocarvalhonoel@gmail.com

Reĝisoros: Amélia Barbosa / Adair Areda
Lernejo Lazaro Zamenhof
Brazlândia - DF

Rim.: Bv. nepre informi al viaj geamikoj.

01 EŬRO = R\$ 2,63
(27 okt. 2012)

A. Carvalho

X

LA VIDVINEGO

José de Alencar



Tradukis:

Porto Carreiro Neto

Brazila Esperanto-Ligo



Verkoj aĉeteblaj ĉe la BEL-Butiko (Libroservo)

Telefono: 3226-1298

belabutiko@esperanto.org.br



BEL@Butiko

belabutiko.esperanto.org.br

FURORAĴOJ

Eldonitaj de Brazila
Esperanto-Ligo

Remetente:

Liga Brasileira de Esperanto

SDS Ed Venancio III - sala 303

70393-902 Brasília-DF

NI LERNU KUN

PORTO CARREIRO NETO



Aymoré Vaz Pinto
Euripedes Alves Barbosa

Brazila Esperanto-Ligo

